**PILO-PRESS**
Internacia
Informservo

JUNA AMIKO
Nr-o 1/3a
Jarkolekto
Ĵus aperis!
Jarabono 3,-- DM

Abonu ĉe Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 6/1976 - 5 feb 1976
Aperas ĉiusemajne

## 60-a Universala Kongreso en la bulgara televido

Sofio (pp) - La Informa Servo de Bulgara Esperanto-Asocio sciigas: "Bulgara Televido elsendis la 10-an de januaro en la kadro de la unua programo 25-minutan filmon pri la 60-a jubilea Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago. La filmo emfazis momentojn de la kongreso, intervjuojn kun s-ro G. Kühlmann, prezidanto de LKK, kun d-ro H. Tonkin, prezidanto de UEA, kun s-ro V. Belomaĵov, la bulgara ambasadoro en Kopenhago, kun s-ro N. Aleksiev, prezidanto de Bulgara Esperanto-Asocio kaj MEM, kaj kun s-ro K. Draĵev, direktoro de Bulgara Esperanto-Teatro. Sekvis longa raportaĵo pri la prezento de Bulgara Esperanto- Teatro de la komedio "La servisto de mastroj".

Tiu jam estas la dua elsendo; la sama filmo jam estis elsendita en la kadro de la dua programo la 30-an de septembro pasintjare.

Bulgara Televido ankaŭ je aliaj okazoj elsendis erojn de aranĝoj de la bulgaraj esperantistoj, sed ĉi tiu estas la plej longa kaj enhavoriĉa.

## Seminario de KEJA

Zagrebo (pp) - Kroatia Esperanta Junulara Asocio (KEJA) montras unuajn signojn de sia renaskiĝo; post akcepto de nova statuto KEJA ricevas subtenon de Junulara Ligo en SR Kroatio, kio ebligas ĝian novan viglecon.

Por informi kaj aktivigi siajn membrojn KEJA organizis de la 23-a ĝis la 25-a de januaro 1976 en Velika ĉe Slavonska Požega seminarion por gvidantoj, kiun ĉeestis 29 delegitoj el 17 lokoj de Kroatio. La ĉeestintoj diskutis pri plilarĝigo de la movado en Kroatio kaj povis informiĝi pri la historio de TEJO (Ulrich Brandenburg) kaj pri specifaj trajtoj de Esperanto-historio kun aparta prilumo de Instituto por oficialigo de Esperanto kies labormetodoj postlasis en Kroatio signifoplenajn spurojn.

Oni utiligis la seminarion por kunordigi laborplanojn kun najbaraj movadoj en Slovenio kaj Bosnio-Hercegovino.

El la laborplano por 1976 valoras substreki seminarion "Lingvo kaj diskriminacio" okazonta en Zadar de la 23-a ĝis la 25-a de aprilo. Celo de la seminario estas ripeti por KEJA-membroj KER-tipan seminarionkaj prezenti tiukampajn ĝisnunajn atingojn al pli larĝa juna Esperanto-publiko. Eksterlandaj partoprenantoj estas bonvenaj samkiel al laborbrigado okazonta en aŭgusto sur Tjentiste en Bosnio pri kiu baldaŭ eblos ricevi detalojn. (KEJA, Amruša 5, YU 41000 Zagreb)

## 203 parlamentanoj por Esperanto

Parizo (pp) - 203 parlamentanoj el ĉiuj partioj de Francio sin deklaris favoraj al la leĝopropono, kiu rekomendas ne-devigan instruadon de Esperanto en lernejoj. (lgtx)

**********************

Pilo-Press: Jara abono 30,- GM Bonvolu pagi al Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, Pĉk. Nürnberg 819 56-851

## Bicikle al Ateno

Parizo (pp) - S-ro Georges Krassovsky, animanto de la ekologia movado "Combat pour l'Homme" intencas organizi ĉi-somere biciklan pilgrimon ĝis Ateno, lulilo de la Eŭropa civilizo. Kvankam ne esperantisto, sed tre favora al Esperanto, li esprimis la deziron kunordigi sian agadon kun la vojaĝo de esperantistoj partoprenantaj la Universalan Kongreson en Ateno. Estus bone, ke esperantistoj diverslandaj, scipovantaj la francan lingvon, ebligu kunordigadon. Laŭ la propraj vortoj de G. Krassovsky, "ekologia turismo" estas la taŭga esprimo por priskribi tiun agadon.

La biciklontoj surportos verdajn subvestojn kun la slogano "Ni savu la naturon" en ĉiuj lingvoj de Eŭropo. Ili rilatos kun la gazetaro, radio kaj televido de ĉiuj landoj, kiujn ili trapasos. Jam plurfoje S-ro Krassovsky sukcesis kapti la atenton de gravaj ĵurnaloj, ekz. de "Le Monde", kaj tiu plia iniciato povus havi ankoraŭ pli grandan eĥon se dekoj da esperantistoj aktive partoprenus.

Interesatoj bonvolu rilati al: Combat pour L'Homme, S-ro Georges Krassovsky, 7 rue Bouicaut, F-75015 Paris, Francio. Bonvolu diskonigi ĉi tiun komunikon!

## Gratuloj al ĉefepiskopo

Paderborn (pp) - Okaze de la 50-a naskiĝtago de la ĉefepiskopo de Paderborn, D-ro J.J. Degenhardt, la Eŭropa Klubo sendis la jenan gratulleteron en Germana kaj Esperanto:

"Okaze de via festotago ĉiuj niaj ĉefprofesiaj kaj volontulaj kunlaborantoj gratulas al vi plej kore kaj deziras al vi ankaŭ por la dua duonjarcento de la vivo ĉion penseble bonan kaj la riĉan benon de Dio. Kun koraj salutoj Hermann Behrmann, prezidanto"

## Esperanto-programoj per IBRA-radio

Stockholm (pp) - El Dia Regno, n-ro 12/75, ni citas:

Ibra-Radio denove sendos Esperantajn programojn ek de januaro 1976 per Radio Mediteran, Malto, ĉiun merkredon je 22 - 22,15 horo MET. La elsendoj okazos en la 49 m bendo, 6 MHc.

Bonvolu aŭskulti kaj raporti pri la aŭdeblo kaj kiel vi ŝatas la programojn de Ibra-Radio, Box 396, S-101 25 Stockholm, Svedio. Nur se sekvos tiaj raportoj la Esperantaj programoj estos disaŭdigataj estonte. Erik Carlén.

## SIA 1976 - Salutu viajn amikojn!

### Propono el Stuttgart

KELI-Grupo Stuttgart sendis al Pilo-Press proponon lige kun la Semajno de Internacia Amikeco 1976, kiu estos de la 23-a ĝis 29-a de februaro. S-ro Alfred Niegisch proponas, ke Pilo-Press aperigu speciala(j)n paĝo(j)n kun salutoj okaze de la Semajno de Internacia Amikeco (SIA) en formo de anoncetoj simile al bondeziroj kristnaskaj kaj novjaraj en lokaj gazetoj.

Pilo-Press tion volonte faros! Kiu do volas saluti siajn amikojn okaze de SIA, estas petata sendi sian adreson kaj saluttekston (maksimume dek vortoj) ĝis la 17-a de februaro al Ludwig Pickel, Pilo-Press, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1. La salutanoncetoj aperos en n-ro 8 de la 19-a de februaro. La prezo por 1 anonceto estas 2,- GM pagebla per germanaj poŝtmarkoj neuzitaj aŭ per tri internaciaj respondkuponoj.

Aperis

JUNA AMIKO, Internacia Lerneja Esperanto-Revuo
3-a Jarkolekto, Numero 1 (Septembro 1975)

Juna amiko vere estas belaspekta interesa revuo por infanoj, lernantoj, sed ankaŭ por plenkreskulaj komencantoj kun varia facile legebla enhavo kaj multaj ilustraĵoj!
Kvankam ĝi aperas sub aŭspicioj de ILEI kaj estas eldonata en Hungario, tamen ankaŭ tiu revuo suferas je la konata malsano de E-revuo, la malmultnombreco de abonantoj!

En la redakcia enkonduko ni legas: "Pasis unu jaro, pasis ankaŭ la dua, kaj JUNA AMIKO ankoraŭ vivas. Dank' al via fidela apogo, la redaktistaro riskas aliri al la 3-a jarkolekto, malgraŭ ke inflacio kreskas en la tuta mondo kaj, ke pluraj Esperanto-gazetoj staras sur la rando de abismo. JUNA AMIKO ne estas escepto. Ankaŭ ni bezonas fortan subtenon....."

********

Homo kaj Kosmo, astronomia Esperanto-revuo

Jaro XIII, 1975 N-ro 3-4 (3-a - 4-a jarkvaronoj)

Ankaŭ tiu vere elstara revuo eldonis siajn du lastajn numerojn de 1975 en duobla kajero kun prokrasto. Por ĝi validas la samaj supre diritaj vortoj. Estus vere bedaŭrinde se ankaŭ tiu popular-scienca revuo devus malaperi pro indiferenteco de esperantistoj. Ĉu la helpokrio utilos?

"La situacio estas despli zorgiga, ĉar ne plu estas garantiata subvencio kiun ni, dank' al komprenemo de kelkaj elstaraj funkciuloj en la respublika instanco, ĝis nun ricevadis. Do, refoje ni petas vin, helpu nin en la strebadoj eldonadi popularan natursciencan Esperanto-revuon "Homo kaj Kosmo", skribas la redakcio.

*********

Abonu la revuojn JUNA AMIKO kaj HOMO kaj Kosmo ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1.

Abonprezoj: JUNA AMIKO 3 numeroj jare 3,-- DM
HOMO kaj KOSMO, 4 numeroj jare 6,-- DM

Ankaŭ malnovaj numeroj estas ankoraŭ haveblaj! Mendu tuj!

***********

Esperanto en Radio  Radio Varsovio: Ĉu 1976 superkosma?

Dum januaro 1976 Radio Varsovio, t.e. la Esperanto-Redakcio, ricevis ĉ. 600 korespondaĵojn. Se tiu tendenco daŭros dum la tuta jaro, konsiderante, ke dum la someraj monatoj la korespondemo malkreskos, la jaro 1976 alportos al la Esperanto-Redakcio de Varsovio novan rekordon. Ni riskas profeti, ke dum 1976 alvenos en Varsovio inter 6000 kaj 7000 korespondaĵoj. Cetere en la pasinta semajno alvenis 155 korespondaĵoj kaj dum la antaŭ-pasinta semajno 194 leteroj kaj poŝtkartoj.

Sed same necesas plialtigi la nombron de korespondaĵoj ankaŭ de aliaj radio-stacioj emisiantaj en Esperanto, Vieno, Romo, Zagrebo, Svisa Kurtonda Servo, Pekino k.a.

Cetere, Vieno elsendis raporton de S-inoj I. Plazotta kaj E. Lins pri la Pedagogia Seminario Jarfina en Neustadt/Weinstr., en kiu ili speciale laŭdis la lokajn aranĝantojn, S-roj Kaukal kaj Ritthaler.

## Eŭropa Esperanto-Revuo Jarkolekto 1975

### Kompletaj jarkolektoj haveblaj

Nürnberg (pp) - La unua jarkolekto de Eŭropa Esperanto-Revuo nun estas kompleta. Ok numeroj sur 96 paĝoj grandformataj - DIN A 4 - prezentas varian interesan enhavon kun multaj fotoj.

Eŭropa Esperanto-Revuo havas konstantajn rubrikojn: Eŭropa Panoramo - El la Germana Esperanto-Movado - Pozitive Junulara Bulteno - Literaturo - Kulturo.

El la enhavo de la jarkolekto 1975:

Ĝeneralaj temoj

Prof. D-ro Helmar Frank, Lingvopolitiko por Eŭropo
Eŭropa kooperad-projekto, Pedagogiko-Interlingvistiko-Kibernetiko
La lingva situacio en Eŭropo, Kolokvio en la Eŭropa Akademio Otzenhausen

Primovadaj temoj

Prof. D-ro Humphrey Tonkin, Pri la celo de la Esperanto-Movado (El la malferma parolado de la 60-a UK en Kopenhago)
Intervjuo kun Humphrey Tonkin
Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA, Mesaĝo por 1976
D-ro Renato Corsetti, Pri regiona agado
Peter G. Forster, La ideologio de Esperanto kaj la koncepto de superŝtato

Prilingvaj temoj

Georg Chr. Sack, Sonpentrado en Esperanto
Hugo Greff, Al Toronto -ideologikritiko
Karlheinz Schwartz, Infanoj en Toronto -provo de apreco

El Pozitive - junulara bulteno

Guido Brandenburg, GEJ-junuloj en Pollando
Ulrich Brandenburg, La rolo de lingvo kaj kulturo en politika subpremado, raporto pri seminario en Portugalujo

Kulturaj temoj - Literaturaj kontribuaĵoj

Thomas Morawa, Japanio - vidita de interne, impresoj kaj iluminacioj dum vojaĝo al kaj en la Lando de Sun-Leviĝo
D-ro A. Baur, Pri la svisgermana kaj malaltgermana lingvoj
Pola Esperanto-Teatro
Hans Jakob Christoffel von Grimmelshausen, La aventuroj de Simplicius Simplicissimus (4 ĉapitroj)
Ephraim Kishon, 5 satiroj el "Ne tiel laŭte antaŭ Jeriĥo"
Kie troviĝas Tuval?
Eĉ lavomaŝino estas nur homo
Pri la vivo kun komputeroj
Kiel eldonistoj reklamas
La rusoj venas (Tradukis Gerhard Ziegler)

Krome la jarkolekto entenas multajn raportojn kaj informojn el la Esperanto-movado kaj kontribuaĵojn pri diversaj temoj.

La enhavo estas interesa kaj aktuala ankoraŭ nun kaj por multaj jaroj; la literaturaj kontribuaĵoj valoras esti legataj de multaj esperantistoj. Aĉetu kaj donacu la kompletan jarkolekton 1975!

Prezo inkl. afranko 12,- DM Mendu ĉe Ludwig Pickel, Postfach 2113 D-8500 Nürnberg 1, Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56-851

La kuranta jarkolekto 1976 estas abonebla kontraŭ 16,-- DM!